Postparolo

‚Winnetou' kaŭzis veran fluegon da poŝtkartoj kaj leteroj al mi. Ĝi ankoraŭ fluas plu, kaj ŝajnas neniam finiĝi. Kia amaso da supozoj kaj demandoj! Kiu respondu ilin ĉiujn? Mi petas pri pacienco.

Jes, pri pacienco, ĉar mi povas malkaŝi al la leganto, kies intereson, jes amon mia Winnetou gajnis, ke mi ankoraŭ ofte kaj plu rakontos pri la plej bona el miaj amikoj. La tri volumoj de ‚Winnetou' ja nur estas elektaĵo de ĉio, kion mi travivis dum la dek kvar jaroj de mia amikeco al li ĉe lia flanko, kaj kion mi estos raportanta poste.

Hodiaŭ nur unu aĵon plu:

Mi estis promesinta al la apaĉoj konduki ilin post mia reveno de la Malhela Akvo en la Gros-Ventre-montojn, al la tombo de ilia ĉefo. Sed intertempe tio estiĝis neeblaĵo. Estis je la fino de decembro. La sezono do estis troe malfruiĝinta, ke ni ne povis riski rajdadon en la plej sovaĝajn kaj neplaĉajn partojn de la roka montaro, kio minimume estus daŭrinta du monatojn, kaj estus kondukinta nin en la plej profundan vintron. Kaj kion tio signifas, povas nur agnoski, kiu kiel mi foje semajnlonge nemovebliĝis en tiuj regionoj en la alta neĝo. La apaĉoj, kiuj estis kutimiĝintaj al pli suda kaj multe pli milda klimato, ĉiukaze ne povis havi imagon pri la penegoj, en kiujn ili estus troviĝintaj.

Tial mi konsolis la nepacientantojn per prokrasto ĝis la printempo, kaj promesis resti ĉe ili ĝis tiam, per kio mi kaŭzis grandan ĝojon de ĉiuj. Mi volas tie ĉi antaŭmencii, ke ni fakte faris tiun rajdadon en la printempo. Ni bezonis pli ol unu monato ĝis la Metsur Creek, kaj venis ĵus je la ĝusta tempo, ĉar ni povis helpi al niaj amikoj en la nova Helldorf-vilaĝo nesukcesigi atakon de la ogelaloj. Ĉar tiu atako celis malpli al la vilaĝo, sed plie al la arĝentopafilo de Winnetou, kiujn la ogelaloj volis kiel venkosigno, mi transprenis per konsento de ĉiuj apaĉoj la arĝentpafilon kun mi, kaj poste en la hejmejon, kie ĝi hodiaŭ estas unu el la plej sanktaj memorigaĵoj pri mia pasinta amiko.

La tempo ĝis la komenco de la rajdado ne troe longiĝis al mi. Estis unue la funebraj festoj, kiuj estis farataj pro la honoro de la plej fama kaj plej amata ĉefo de ĉiuj apaĉoj, kaj kiuj daŭris semajnojn. Tiam gravis doni novan ĉefon al la Meskaleroj. Mi devis efikigi mian influon, ke estis elektata apaĉo, pri kiu mi povis esperi, ke li agus praktike tute

en la senco de la pacema kaj grandanima klopodado de mia morta amiko. Elektata estis Til-lata, malgraŭ sia nomo komprenema viro. Fakte li estis inter ĉiuj ruĝuloj, kiuj taŭgis por digno de ĉefo, la plej nepartieca per la antaŭjuĝoj de la ruĝa pri la blanka raso.

Ĉu li vere sukcesus pluigi la superan influon, kiun Winnetou estis havinta al la aliaj apaĉaj triboj?

La historio montris poste, ke tio bedaŭrinde ne estis la kazo. La unuopaj apaĉaj triboj iom post iom perdis la interkontakton, kiu estis plutenita per Winnetou lerte, sed ankaŭ pene, kaj ili elĉerpiĝis per sangofluaj, senutilaj bataloj kontraŭ la palvizaĝo. Aparte la nomo de la ĉefo Geronimo el la tribo de la Ĉirikavoj estas enskribita per sangokovrita grifelo en la historion de la okzidentaj ŝtatoj.

La testamento de la apaĉo, kiun mi elterigis ĉe la Nugget-tsil, estis neigata — disblovita en ĉiujn ventojn. Sed ankaŭ la spirita heredo, kiun li postlasis, estis akceptita de neniu el siaj samtribanoj. Neniu el ili posedis la elstaran eminentecon kaj la venkriĉan kaj tial venkpromesantan kuraĝon pro tio.

Ĉu neniu? Ĉu vere neniu?

Sed eble jes!

Tio, kion mi estos rakontanta, estu la pruvo, ke, se la antaŭsignoj ne trompas, la ruĝa raso finfine, finfine komencas rekoncentriĝi pri si mem, do ke la ĵus farita juĝo pri ili devas esti korektata. Sed des pli mi rajtas rakontadi, des pli glore kaj brile aperas la imago antaŭ mia okuloj de tiu, kiun mi priskribis kaj ĉiam pli amis, des pli ke li, por kiu mi devis pretigi malvarman tombon alte supre sur la bordo de la Metsur Creek, regajnas varman vivon kaj impresigan simbolecon, li, la plej nobla el la indianoj:

WINNETOU,
la ĉefo de la apaĉoj!